

Statuto

kaj

Regularo pri Kongresoj



Ĝenerala
Konfederacio
de la Laboro

Ĝisdatigitaj dum la 16a ordinara Kongreso okazinta en Malago

Eldonita de la Teritoria Federacio de la Baix Llobregat
Carretera d'Esplugues, 46
ES-08940 Cornellà de Llobregat

Eldonita laŭ la ĝisdatigo de la 16a Ordinara Konfederacia Kongreso de ĜKL, okazinta en Malago je junio de la 2009a

Esperantigita de Jesús González

Statuto

Statuto

1a titolo: Difino kaj celo

Artikolo 1a. La Ĝenerala Konfederacio de la Laboro (ĜKL) estas asocio de gelaboristoj, kiu difinas sin kiel anarkisindikatisman kaj sekve: de laboristklaso, sendependa, memadministrada, federaciisma, internaciisma kaj liberecana.

Artikolo 2a. La Ĝenerala Konfederacio de la Laboro (ĜKL) celas:

a) Disvolvi la asociemon de la gelaboristoj, sendepende de ties sekso, raso, nacieco, lingvo kaj religiaj aŭ politikaj ideoj.

b) La emancipiĝon de la gelaboristoj per la konkero, farita de ili mem, de la rimedoj de produktado, dissendo kaj konsumo, kaj la atingo de liberecana socio.

c) La neniigon de ĉiaj ekspluatado kaj subpremado, kiuj atencas kontraŭ la persona libereco.

d) La praktikon de la interhelpo kaj la solidareco inter la gelaboristoj, samkiel la defendo de ties tujaj sociekonomiaj interesoj.

e) La stimulado kaj organizado de agadoj celantaj:

-La sisteman disvolviĝon de la profesia instruado.

-La bontenadon de la ekologia ekvilibro kaj la defendo de la naturmedio.

-Ĉiutipan helpon al la kolektivoj, grupoj, sektoroj kaj personoj, kiuj suferas iun tipon de sociaj, profesiaj, ekonomiaj, rasaj ktp, diskriminacio aŭ marĝeniĝo cele faciligi ilian socian integriĝon.

-Ĉiaspecajn kulturajn instruadon kaj diskonigadon, en ajna kampo aŭ nivelo.

f) -Stimuli la konon kaj disvastigon de la liberecana kaj anarkisindikatisma penso.

-Helpi la studon kaj esploron pri la historio de la sindikatismo, anarkisindikatisma kaj liberecana movado.

-Helpi la studon kaj esploron pri la sindikatismaj tendencoj en Hispanio kaj alilande. -Ellabori kaj havigi informon pri ajna temo, kiu interesas al la laborista klaso.

-Stimuli la studon kaj esploron en la kampo de la ekonomiaj kaj sociaj sciencoj por la plej bona plenumo de la antaŭaj celoj.

Por atingi la menciitajn celojn, la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro (ĜKL) starigu rilatojn kun ĉiuj samcelaj laboristaj institucioj laŭ internacia aŭ tutlanda nivelo, kiuj povas helpi ĝian atingon kaj ĝi ankaŭ uzos preferinde la rimedojn de rekta ago, kiujn ĉiuokaze oni konsideras konvenaj, laŭ difino el ĝiaj Plenoj kaj Kongresoj.

2a titolo: Agadkampo kaj sidejo

Artikolo 3a. La Ĝenerala Konfederacio de la Laboro (ĜKL) havas kiel esenca sfero la teritorion de Hispanio.

Artikolo 4a. La profesia kampo de la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro (ĜKL) estas tiu de ĉiuj permanaj aŭ intelektaj laboristoj, dungitoj aŭ senlaboruloj aŭ pensiuloj kaj la memstaraj laboristoj sen salajruloj sub iliaj ordonoj.

Artikolo 5a. Ĉiucele, la sidejo de la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro (ĜKL) staras en Madrido, strato Sagunto, 15, 1^o, rajtante la Konfederacia Komitato de la ĜKL starigi la delegitejojn, kiujn ĝi kredas bezonaj. La Konfederacia Komitato rajtas ŝanĝi la sidejon, kiam la cirkonstancoj tiel konsilas tion.

3a titolo: Gvidantaj principoj de funkciado

Artikolo 6a. La funkciado de la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro (ĜKL) tiel por la adopto de interkonsentoj, kiel por la elekto de ĝiaj organoj de kunordigo, reprezentado kaj administrado, regu sin per principoj de rekta demokratio.

Artikolo 7a. Ĉiuj organoj de la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro (ĜKL) estas devigataj havigi ĉian informon, kiun petas al ĝi ajna federaciita organo.

Artikolo 8a. La diversaj organoj aliĝintaj aŭ federaciitaj al ĜKL havas la plej eble grandan memstarecon en sia agadkampo. Dum la praktikado de tiu memstareco, ili ne rajtas modifi nek kontraŭdiri la nunan Statuton de la ĜKL, nek la ĝeneralajn interkonsentojn, aprobitajn de ĉi tiu Organizo. La cititaj organoj estas la solaj respondekantoj de la devigoj, kiujn ili alprenas dum sia agado.

4a titolo

Unua ĉapitro. Strukturo kaj funkciado

Artikolo 9a. La ĜKL estas konfederacio de sindikatoj, kiu strukturas sin tra la teritoria sfero difinita de la 3a artikolo de ĉi tiu Statuto.

La sindikatoj, federaciitaj inter ili, starigas la diversajn Urbajn, Distriktajn (Plururbajn), Interdistriktajn aŭ Provincajn Federaciojn kaj la Teritoriajn Konfederaciojn.

La sindikatoj federaciigās al la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro (ĜKL) per iliaj respektivaj Teritoriaj Konfederacioj.

Artikolo 10a. La sindikatoj, kiuj apartenas al sama aŭ simila profesia agado federacias inter si, cele starigi la nomitajn Sektorajn aŭ Branĉajn Federaciojn.

Al ĉi tiuj Federacioj ankaŭ apartenas kaj estas parto la respektivaj Sekcioj aŭ Kernoj de sektoro, konsistigantaj la diversajn Ununurajn kaj/aŭ Diverssektorajn sindikatojn de la ĜKL.

Dua ĉapitro. Pri la sindikatoj

Artikolo 11a. La Sindikato estas la organiza bazo de la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro.

Por starigi sektoran sindikaton, necesas minimumo da 75 aniĝintoj.

Se ne estas atingita ĉi tiu nombro, ili sekciigu en la Diverssektora sindikato. Nur tiaj sindikatoj rajtas stariĝi per nombro da aniĝintoj malplia ol 75 sed ne malplia ol 10.

La sindikatoj rajtas stariĝi sur urba, distrikta, interdistrikta aŭ provinca sfero. Nu, se aniĝintaro de iu sektoro, ne malplia ol 75, decidas starigi sektoran sindikaton de malsupera teritoria sfero, al kiu ili apartenas tiumomente, ĉi tiu lasta aŭtomate modifu laŭstatute sian agadsferon laŭ la nova teritoria situacio.

Ĉiuokaze, ne povas ekzisti en sama teritoria sfero du samsektoraj nek du Diverssektoraj sindikatoj.

Artikolo 12a. La Sindikatoj rajtas starigi sindikatajn sekciojn de entrepreno, sektoro kaj/aŭ laborejo.

Artikolo 13a. La sindikatoj devas stariĝi en la sama funkcia kampo ol la Sektoraj aŭ Branĉaj Federacioj difinitaj en la 23a artikolo de ĉi tiu Statuto.

Tamen, se la koncernitaj aniĝintoj decidas tion, ili rajtos stariĝi kiel sindikato, kiu grupigas pli ol unu sektoron de la difinitaj en la citita artikolo, havante la neeviteblan devigon apartigi la respektivan aniĝon laŭ la konkretaj Sektoraj aŭ Branĉaj Federacioj, kiuj aperas en la citita 23a artikolo, por tiel garantii la ĝustan disdonon de la kotizo kaj la partoprenon en la organizo.

Ajnokaze, por ĉi tiu lasta afero konsideru kaj observu en ĉiuj iliaj punktoj la sekvajn premisojn kaj/aŭ kondiĉojn:

a) La kaŭzo por la starigo de plursektora sindikato ekskluzive baziĝu sur kialoj de sindikata aŭ organiza efikeco.

b) Oni ne rajtas starigi sindikaton de sfero de entrepreno aŭ specifa subsektoro de la produktado.

c) Se la aniĝintoj, apartenantaj al federacia sektoro el la enlistigitaj en la 23a artikolo kaj aniĝintaj al plursektora sindikato de la antaŭe cititaj, decidas per Asembleo disiĝi de ĝi kaj stariĝi kiel sektora sindikato, por observi tian decidon, la menciita plursektora sindikato aŭtomate modifu laŭstatute sian nomon kaj/aŭ agadkampon, laŭ la nova organa realaĵo koncernanta ĝin.

En ĉi tiu sama kunteksto oni rajtas starigi la Ununurajn sindikatojn, strukturante sin similmaniere al tiuj de Diverssektoraj, estante neakordigebla la ekzisto de kiu ajn el ili en sama teritoria sfero.

Artikolo 14a. Por la aliĝo de nova sindikato al la ĜKL necesas, ke ĝi petas tion skribe al la respektiva Urba Federacio aŭ, manke de ĝi, al la organo de supera teritoria sfero, kunsendante kopion de la aliĝo, indikante nombron da aniĝintoj kaj ĝian Statuton aŭ internan Funkciadregularon, kiuj neniel povas kontraŭdiri la Statuton nek la ĝeneralan normaron de la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro. Oni sendu kopion de ĉi tiu dokumentaro al la respektivaj Konstantaj Sekretarioj de la Teritoria kaj Sektora Federacio kaj ankaŭ al la Konfederacia Komitato de la ĜKL.

Plenumitaj la koncernaj formalajoj, estas la KS de la Urba Federacio aŭ, manke de ĝi, la respektiva Teritoria Konfederacio, kiu unuinstance, skribe kaj en la maksimuma limtempo da unu monato decidas pri la akcepto aŭ ne de la pretendita aliĝo, informante pri la rezultato la Konfederacian Komitaton de la ĜKL, kiu siavice kaj en la tuja ordinara Konfederacia Komitatkunveno decidis pri tiu afero definitive, ne povante kontraŭdiri la antaŭan decidon krom pro evidenta malobservo de la Statuto

kaj ceteraj ĝeneralaj interkonsentoj de la Organizo. Kiam la koncerna proklamo estas definitiva, la KS de la Konfederacia Komitato de la ĜKL informu la ĵus kreitan sindikaton kaj aliajn rilatigitajn konfederaciajn organojn, donante al la unua la kondon, kiu legitimas ĝian plenan aliĝon al la ĜKL.

Artikolo 15a. La Sindikato ne malfondos dum tion interkonsentas 75 aniĝintoj okaze de Branĉa Sindikato, aŭ 10 okaze de Diverssektora Sindikato.

Artikolo 16a. La havaĵaro de la malfondita Sindikato estos donita al la respektiva Urba, Distrikta, Interdistrikta aŭ Provinca Federacio, aŭ manke de ĝi, al ĝia respektiva Konfederacio.

Artikolo 17a. Eĉ respektante la sendependecon de la sindikatoj ene de ilia funkciadkampo, oni starigas la sekvan kondiĉon de garantio por ĝia demokratia funkcio:

-Pri la Ĝenerala Asembleo de la Sindikato.

La maksimuma decidorgano de la sindikato estas la Ĝenerala Asembleo el ĝiaj aniĝintoj, kiu determinas la periodecon de sia okazigo. Ĉiuokaze, ĝi okazu minimume unu fojo jare kaj estas deviga ĝia plenumo por ĉeesti plenrajte al Konfederaciaj Plenoj, Konferencoj kaj Kongresoj, ordinaraĵoj aŭ eksterordinaraĵoj, de teritoria aŭ sektora karaktero kaj por la elekto de postenadministrado, la aprobo de la jaraj agadplanoj kaj ekonomiaj bilancoj aŭ etatoj.

La ordinara asembleo de la Sindikato estas kunvokata de la Ĝenerala Sekretario de ties Konstanta Sekretariaro, kun minimuma anticipo de 20 tagoj sendante al ĉiu aniĝinto la Tagordon, kiu estos ellaborata de la KS kun la bezonaj klarigaĵoj, kaj la dokumentaron, kiu necesas por taŭga preparado de la debato.

Eksterordinare kunvokas la Asembleon la Konstanta Sekretariaro mem aŭ per peto de triono el la aniĝintoj. Ĉi-okaze, la kunvoko plenumiĝu minimume 7 tagoj de anticipo.

Ambaŭokaze kaj komence de la asembleo oni nomumas la respektivan Asembleestraron, kiu decidas la hortabelon de la kunsido kaj plenumas la respondan asembleakton.

Tria ĉapitro. Pri la urbaj, distriktaj, interdistriktaj aŭ provincaj federacioj

Artikolo 18a. La Urbaj, Distriktaj, Interdistriktaj aŭ Provincaj Federacioj estas devigataj adapti siajn normojn de interna funkciado al la ĝeneralaj kaj ceteraj interkonsentoj de la ĜKL.

Pri la malfondo de la Urbaj, Distriktaj, Interdistriktaj aŭ Provincaj Federacioj de Sindikatoj

Artikolo 19a. La Urba, Distrikta, Interdistrikta aŭ Provinca Federacio de Sindikatoj malfondiĝu se, en sia teritoria sfero, nur restas unu sindikato. Ĝia havaĵaro estos donita al tiu sindikato se ĝi daŭre ekzistas, kaj male, al la respektiva Konfederacio aŭ, manke de ĝi, al la Konfederacia Komitato de la ĜKL.

Kvara ĉapitro. Pri la teritoriaj konfederacioj

Artikolo 20a. La Teritoriaj Konfederacioj estas devigataj adapti siajn normojn de interna funkciado al la ĝeneralaj kaj ceteraj interkonsentoj de la ĜKL.

Artikolo 21a. La Ĝenerala Sekretario aŭ, manke de ĝi, la Sekretario pri Organizo de la Konfederacia Komitato de Konfederacio havas la juran kaj publikan reprezenton en ĝia teritoria sfero, estante plenrajtaj membroj de la Konfederacia Komitato de la ĜKL. Konsekvence, ambaŭ estas submetataj al la reĝimo de leĝaj baroj priskribita de la 32a artikolo de ĉi tiu Statuto, samkiel ajna alia Sekretariarano de Teritoria Konfederacio, kiu iumomente povas anstataŭi ilin antaŭ la Konfederacia Komitato de la Organizo.

Pri la malfondo de la teritoriaj konfederacioj

Artikolo 22a. Teritoria Konfederacio malfondiĝu se, en ĝia agadkampo, nur restas unu Urba, Distrikta, Interdistrikta aŭ Provinca Federacio. La havaĵaro de koncerna Konfederacio estos donita al la Urba, Distrikta, Interdistrikta aŭ Provinca Federacio, kiu daŭre ekzistas aŭ, manke de ĝi, al la sindikatoj, kiuj restas en tiu teritoria sfero; se ankaŭ ne restus sindikatoj, la menciita havaĵaro estos donitaj rekte al la ĜKL, pere de la Konfederacia Komitato.

Kvina ĉapitro. Pri la sektoraj federacioj

Artikolo 23a. La Sektoraj aŭ Branĉaj Federacioj havas similan strukturon al tiu de la ĜKL, adaptante sin al la respektiva profesia kampo, disvolvante sian propran funkciadnormaron, kiu neniel povas kontraŭdiri la ĝeneralan normaron kaj ceterajn interkonsentojn de la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro.

Koncernaj Federacioj strukturiĝas per la branĉoj de produktado aŭ servo, kiuj tuj poste enlistigas sin:

- Publika Administracio.
- Nutrado, Komerco kaj Hotelservado.
- Banko, Borso, Ŝparkaso, Asekuroj, Kreditkompanio kaj Officejoj.
- Kampo, Terkulturo, Brutobredado kaj Fiŝkaptado.
- Konstruado, Ligno, Ceramiko kaj Korko.
- Energio, Minlaboro kaj Kemiindustrio-kaj-rilataj.
- Instruado.
- Spektakloj, Informado, Papero kaj Grafikaj Artoj.
- Emeritoj kaj Pensiuloj.
- Purigadoj kaj Bontenado.
- Metal.
- Sano.
- Transportoj kaj Komunikoj.
- Teksaĵindustrio, Pelto kaj kromproduktoj.

Okaze de apero de nova sektoro aŭ branĉo ne enlistigita inter la supre menciitaj Federacioj, estas la Konfederacia Komitato kunveninta en ordinara Komitatkunveno, kiu decidas pri la rekono de la nova sektoro kiel tia kaj/aŭ la starigo de la respektiva Federacio, de provizora maniero ĝis la sekva ordinara Kongreso.

Artikolo 24a. La Ĝenerala Sekretario aŭ, manke de ĝi, la Sekretario pri Organizo de Sektora aŭ Branĉa Federacio havas la juran kaj publikan reprezenton en ĝia sek-

tora kampo, estante plenrajtaj membroj de la Konfederacia Komitato de la ĜKL. Konsekvence, ambaŭ estas submetitaj al la reĝimo de leĝaj baroj priskribita de la 32a artikolo de ĉi tiu Statuto, samkiel ajna alia Sekretariarano de Sektora aŭ Branĉa Federacio, kiu iumomente povas anstataŭi ilin antaŭ la Konfederacia Komitato de la Organizo.

Artikolo 25a. En la entreprenoj de tutlanda sfero, sen malobservi tion akordigitan en la antaŭaj artikoloj, rajtas stariĝi federaciaj sindikatoj aŭ tutlandaj sindikataj sekcioj, por la organiza kaj kunordiga laboro en sia entrepreno kaj la defendo de la konkretaj laboraj interesoj. La ekzistantaj federalaj sindikatoj formas parton de la respondaj Federacioj.

Sesa ĉapitro. Pri la elmigro

Artikolo 26a. La ĜKL rekonas la Grupigojn de Elmigro, al kiuj apartenas ĉiuj eksterlande hispanaj laboristoj, kiuj tion deziras.

Ĉi tiuj Grupigoj federaciigās al la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro pere de ĝia Konfederacia Komitato. Ili partoprenas grupigitaj laŭ landoj, kiel plenrajtaj membroj en ĉiuj oficialaj kunvenoj de la ĜKL.

5a titolo: Pri la aniĝintoj

Artikolo 27a. Por aniĝi al la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro, la laboristo devas plenumi la slipon de sindikata aniĝo kaj aldone kotizi la sumo de la kuranta monato al la respondaj Sindikato aŭ Organo, rekte aŭ pere de la Sindikata Sekcio, ricevante la konfederacian membrokarton kaj la atestilojn de la pagitaj kotizoj.

Ĉiu aniĝinto al la ĜKL disponas la konfederacian membrokarton, kiun oni rajtas postuli al li en ajna oficiala kunveno aŭ por la atingo de konfederaciaj servoj.

Artikolo 28a. La aniĝo plenumiĝas pere de la Sindikatoj aŭ manke de ĝi kaj per ĉi tiu ordo de prioritatoj, pere de la respektiva Urba Federacio, Teritoria Konfederacio aŭ Sektora Federacio, aliĝante tiuokaze kaj siavice al la sektora aŭ Diverssektora sindikato, se la unua ne ekzistus, plej proksima al sia labora aŭ loĝa ejo.

Ĉiu aniĝinto devas aparteni al la sindikato de sia loĝ- kaj labor-loko, krom se li laboras en loko kaj loĝas en alia, en kies okazo oni lasas la eblon elekti sindikaton al la aniĝinto mem.

Povas aniĝi al la ĜKL nek la membroj de la policorganizaĵoj, nek de la profesia armeo, nek de subpremaj armitaj korpusoj.

Ricevita la aniĝpeto, je la maksimuma limtempo da du monatoj, la Konstanta Sekretariaro de la respondeca sindikato aŭ, manke de ĝi, tiu de la respektiva supera konfederacia organo, decidus definitive pri la akcepto aŭ ne de koncerna aniĝo, procedante jesokaze, kiel klariĝas la antaŭa artikolo.

Artikolo 29a. Ĉiu aniĝinto al la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro havas la sekvajn rajtojn kaj devojn:

a) Rajtoj.

-Esti informita pri: funkciado, rimedoj kaj celoj de la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro.

-Ricevi konsiladon kaj, se necesas, la apogon kaj solidarecon de sia Sindikato pri aferoj rilataj al sia sindikata kaj labora agado.

-Partopreni kiel plenrajta membro en la Asembleoj de sia Sindikata Sekcio de entrepreno, sektoro kaj ofico kaj de sia Sindikato.

-Elekti la membrojn de la diversaj organoj de reprezentado de la Organizo laŭ la normoj, kiujn indikas ĉi tiu Statuto.

-Esti elektita por ajna organo de reprezentado de la Organizo laŭ la normoj indikataj de ĉi tiu Statuto. Krom se li estas koncernata de la problemaro esprimita en la 32a artikolo.

b) Devigoj.

-Kotizi la starigita sindikata kotizo.

-Informi la organojn de la Sindikato pri sia sindikata agado kaj la komisioj konfidentaj al li.

-Observi la interkonsentojn el sia Sindikato, el la organoj, al kiuj ĝi estas ligita kaj tio determinita per la Statuto de la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro.

Neniu aniĝinto rajtas realigi ene de la ĜKL agadojn rilatigitaj kun aliaj organizaĵoj eksteraj al ĝi.

La aniĝintoj ne rajtas uzi sian kondiĉon de ĜKL-anoj profite de ajnaj politikaj grupo aŭ kandidataro.

Artikolo 30a. Kiam aniĝinto postulas informon de organa karaktero, li devas fari tion per la tuja organo de reprezento, al kiu li estas interligita.

Artikolo 31a. Produktiĝas la eksigo de aniĝinto pro la sekvaj kaŭzoj:

a) Pro libera decido de li mem.

b) Pro ne pagi la sesmonataj sindikatajn kotizojn, kiam oni postulis tion al li. La pago de la nepagitaj kotizoj kunportas la neniigon de la eliĝo.

c) Pro grava aŭ ripetita neplenumo de la Statuto kaj interkonsentoj de Kongreso aŭ aliaj Oficialaj Kunvenoj de la ĜKL.

La Sindikatasembleo havas la kapablon procedi al la eksigo de la aniĝinto, ĉiam per plimulta kaj rezonita decido el ĝiaj ĉeestantoj, sen malhelpi la rajton, kiun havas la aniĝinto por apelacii koncernan decidon per la respondaj meĥanismoj, kiujn diktas ĉi tiu Statuto.

Artikolo 32a. Por protekti la sendependecon de la ĜKL, ĉiu el ĝiaj aniĝintoj devas observi kaj observigi la sekvan reĝimon de leĝaj baroj kaj organaj devigoj:

a) Dum la ekzerco de siaj respondecoj la aniĝintoj, kiuj havas reprezentajn aŭ administradajn postenojn al ajna nivelo kaj kampo de la konfederacia strukturo, ne povas manifesti publike apartajn opiniojn kontraŭ la Regularo kaj aliaj ĝeneralaj interkonsentoj de la ĜKL, nek eĉ favore al aliaj organizaĵoj aŭ institucioj ekster la ĜKL.

b) La aniĝintoj, kiuj samtempe estas membroj de aliaj organizaĵoj ekster la ĜKL, ne rajtas aparteni al ĝia Konfederacia Komitato kaj, sekve, ankaŭ al ĝia Konstanta Sekretariaro, nek okupi la postenon de Ĝenerala Sekretario aŭ Sekretario pri Organizo

(kiel Ĝenerala Vicsekretario) de la diversaj Teritoriaj Konfederacioj kaj Sektoraj Federacioj, kiuj konsistigas la menciitan Konfederacian Komitaton.

c) Samkuntekste, tiuj membroj ankaŭ ne rajtas partopreni en la Konfederacia Komisiono pri Garantioj.

d) La membroj de plenumaj organoj de regado, administrado aŭ reprezentado de aliaj organizaĵoj aŭ kiuj okupas publikajn postenojn per elekto aŭ nomumo, rajtas aparteni al nenia Sekretariaro de la ĜKL, en ajna nivelo kaj kampo de ĝia organa strukturo.

e) Okaze de postenuloj de la Organizo partoprenantaj en politikaj kandidataroj, ili devas demisii, ne rajtante okupi postenojn en la ĜKL dum daŭras la mandato, al kiu ili kandidatiĝis. Se ili ne faras tion, ili estos aŭtomate demisiigitaj. La malobservo de la antaŭa paragrafo estas konsiderata kiel grava neplenumo de la Statuto, tial oni procedos konsekvence.

f) Okaze malobservi ajna aniĝinto kelkajn el la antaŭaj paragrafoj kaj la oportuna konfederacia organo ne agas konsekvence, de antaŭmalhelpa maniero kaj provizore la Konstanta Sekretariaro kaj la Konfederacia Komitato de la ĜKL rajtas tuj elpostenigi lin el la administrada aŭ reprezenta posteno okupata de li kaj deteni lian aniĝon, al ajnaj konfederaciaj nivelo kaj kampo, ĝis Pleno aŭ Kongreso de ĝenerala karaktero opinios pri tio.

6a titolo: Pri la konfederacia membrokarto kaj la sindikata kotizo

Artikolo 33a. La Ĝenerala Konfederacio de la Laboro havas sian propran konfederacian membrokarton, kiun ĝi havigas al la respektivaj federaciitaj kaj aliĝintaj organoj, por ke siavice ili liveru ĝin al ĉiu aniĝinto. Tial la kreo, dissendo kaj kontrolo de la menciitaj konfederaciaj membrokartoj estas funkcio de la Konstanta Sekretariaro de la Konfederacia Komitato de la ĜKL.

Artikolo 34a. Oni fiksas la devigan monatan kotizon je 9,02 € ĝisdatigita je la jaro 2009.

La kotizdistribuo efektiviĝas de la sekva maniero:

30% Por la Sindikato.

20% Por la Urba Federacio.

20% Por la KS de la Konfederacia Komitato de la respektiva Konfederacio.

30% Por la KS de la Konfederacia Komitato de la ĜKL.

El la 30% enspezita de la KS de la Konfederacia Komitato de la ĜKL oni efektivigu la sekvan distribuon:

40% Por la elspezoj de funkciado de la Sekretariaro mem.

50% Por la Sektoraj Federacioj, disdonante la Sekretariaro al ĉiu starigita Federacio la respondan kvanton laŭ la kotizoj de ĝia sektoro. Kun la responde parto al la federacioj ne starigitaj oni kreas rezervon por plivigli ĝian starigado aŭ, manke de ĝi, la jam starigitajn. La responde parto al la Diverssektoraj sindikatoj distribuas sin laŭ la detalo havigita de ili mem, pliiĝante manke

de ĝi la komunan rezervon.

5% Por solidareca rezervo, kies destino estas antaŭe por-enkarcerigoj de la Organizo, se ĉi tiuj ekzistus.

5% Por rezervo de internacia solidareco.

Por tiuj emeritaj aŭ sendungantaj aniĝintoj, kiuj enspezas neniun monhelpon, la monatan minimuman kotizon oni difinas je 4,20 € ĝisdatigita je la jaro 2009, aplikante la saman distribuon.

La minimuma kotizo aŭtomate revizios sin altige ĉiu jaro, po valoro de 30 centimoj da eŭro, elektante kiel unuan revizian daton la 1an de januaro de 2010.

La antaŭemeritoj pagas kotizon samkiel aktivlaboriston.

La laboristoj kun salajro malplia ol la IMS (Interprofesia Minimuma Salajro), kun nefirmaj kontraktoj, pagas la 50%-n de la ordinara kotizo, kun la samaj procentoj de distribuo aprobitaj de ni.

7a titolo: Pri la gvidantaj organoj de la ĜKL

Unua ĉapitro. Pri la Kongreso de la ĜKL

Artikolo 35a. La Kongreso de la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro (ĜKL) estas ĝia maksimuma decidorgano. Ĝi ordinare okazas ĉiu kvar jaroj kaj eksterordinare, kiam tion decidas la organo, kiu la regularo determinas aŭ tion petas triono de la federaciitaj sindikatoj al la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro (ĜKL).

La manieron de kunvoko, organizo kaj funkciado oni determinas perregulare. Konsente kun la Dua Fina Normo de ĉi tiu Statuto, estas la Kongreso de la ĜKL la sola kompetenta organo, kiu povas modifi ilin.

Dua ĉapitro. Pri la Konfederacia Pleno de la ĜKL

Artikolo 36a. La Konfederacia Pleno estas la maksimuma decidorgano inter Kongresoj de la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro (ĜKL). Ĝi ordinare okazas kun maksimuma periodeco de 2 jaroj (alternante ĉiujare kun la Tutlanda Konferenco de la ĜKL) kaj eksterordinare, kiam tion decidas la Konfederacia Komitato aŭ tion petas triono de la sindikatoj de la ĜKL. La interkonsentoj de la Konfederaciaj Plenoj ne povas kontraŭdiri aŭ substance ŝanĝi tiujn de la Kongreso.

Artikolo 37a. La KS kunvokas la Konfederacian Plenon de la ĜKL almenaŭ 4 monatoj antaŭ ol la dato de ĝia okazo, se estas ordinara Pleno aŭ unu monato se estas eksterordinara.

La kunvoko, kiun oni elsendas al la KS-j de la Konfederaciaj Komitatoj enhavu la daton, la lokon de okazo kaj la tagordon, kiu estos ellaborita de la Konfederacia Komitato dum la Komitatkunveno antaŭe okazinta. Okaze de Eksterordinara Pleno, la Tagordo nur enhavas la punktojn, kaŭzintaj ĝian kunvokon.

Okaze de ordinara Pleno la Tagordo temas ĉirkaŭ Ekonomiaj, Administraj, Socia-politikaj kaj nuntempaj aferoj.

Ekde la kunvokdato oni malfermas limtempon da 45 tagoj, dum kiu povas prezenti la tuta Organizo la proponojn aŭ verkojn por ilia posta publikigado antaŭe al la Ple-

no kaj debato dum ĝi mem. Okaze de Eksterordinara Pleno ĉi tiu limtempo malpliĝas al 10 tagoj.

Artikolo 38a. La Konfederacia Pleno de la ĜKL konsistas el la delegacioj de la Plenoj de ĉiu Teritoria Konfederacio kaj la membroj de la Konfederacia Komitato de la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro, ĉi tiuj lastaj sen voĉdonrajto.

La delegacioj de ĉiu Teritoria Konfederacio konsistas el maksimuma nombro da 8 membroj, elektitaj inter la ĉeestintoj al iliaj respondaj Teritoriaj Konfederaciaj Plenoj.

La delegitoj de la diversaj Konfederacioj devas prezenti la respondajn atestilojn, ellaboritaj de la Sekretario pri Aktoj de la Pleno, en kiu ili estis elektitaj.

Ne povas ekzisti nerektaj delegoj.

Artikolo 39a. La voĉdonoj atribuitaj al ĉiu Konfederacio atingas sin laŭ la mezumo de kotizoj de la 9 antaŭaj monatoj al la Pleno; la antaŭan monaton al la Pleno oni ne prenas en konsidero por ĉi tiu kalkulo.

Artikolo 40a. La malfermon de la Konfederacia Pleno de la ĜKL plenumas la Ĝenerala Sekretario, kiu konsistigas la Malfermestraron kun la cetero de la KS. Ĉi tiu estraro disvolvas la sekvajn taskojn:

- Determino de la hortabelo de kunsidoj.
- Elekto de la Plenestraro.
- Elekto de la Revizia Komisiono pri Atestiloj.
- Elekto de la Revizia Komisiono pri Kontoj.

La proponoj por konsistigi la Plenestrarojn kaj la diversajn Laborkomisionojn estos destinitaj al la Konfederacioj, estante ties delegitoj, kiuj nomumas la delegaciano(j)n, kiuj prenas sur sin la traktitan elekton.

Artikolo 41a. La Plenestraroj konsistas el Prezidanto, Vicprezidanto, du Sekretarioj pri Aktoj kaj Sekretario pri Parolvicoj kun la samaj atribuoj, kiujn havas la Kongresestraro.

Artikolo 42a. La Komisiono pri Atestiloj konsistas el tri membroj delegitaj de la Konfederacioj kaj la Sekretarioj pri organizo de la KS kaj de la Konfederacioj, kiuj agas kiel asesoroj.

La Revizia Komisiono pri Kontoj konsistas el tri membroj delegitaj de la Konfederacioj kaj la Sekretarioj pri Financoj de la KS kaj de la Konfederacioj.

Ĉi tiuj Komisionoj elsendas informon al la Pleno.

Artikoloj 43a. Post la prezento de la Interkonsentoj farita de la diversaj Teritoriaj Konfederacioj, oni elektas la diversajn komisionojn de rezolucipropono, kiuj konsistas el la membroj, kiujn nomumas la Konfederacioj dum la Pleno. Ĉi tiuj delegitoj havas voĉ- kaj voĉdon-rajton en la Komisiono.

Post esti ellaborita la raporto de la koncerna Komisiono pri Rezolucipropono, oni prezentas ĝin al la Pleno, povante la Konfederacioj, kiuj tion deziras prezenti partajn amendojn, kiuj neniel –laŭ opinio de la Komisiono– ŝanĝas nek kontraŭas la sencon kaj enhavon de la traktita raporto, en kies okazo oni devus prezenti ilin kiel apartan voĉdonon.

Ĉiu Komisiono pri Rezolucipropono kunvenas por debati la amendojn, kiujn ĝi akceptas aŭ ne, ellaborante tuj poste sian definitivan raporton, kiun ĝi prezentas al la Pleno por ĝia diskutado kaj balotado. La ne akceptitaj amendoj eblas esti aliigitaj en apartaj voĉdonoj konsente kun tio esprimita en la Regularo de Kongresoj.

Artikolo 44a. Se pro eksiĝo de la Ĝenerala Sekretario aŭ iu membro de la Sekretariaro, antaŭe al la Pleno, necesus lia anstataŭo, la elekto plenumiĝas inter la proponitaj kandidatoj unu monato antaŭ ol la okazdato de la Pleno, aplikante similajn kriteriojn al tiuj de la Konfederacia Kongreso de la ĜKL.

Tria ĉapitro. Pri la Konfederacia Komitato de la ĜKL

Artikolo 45a. La Konfederacia Komitato de la ĜKL estas la organo, kiu kunordigas kaj disvolvas la plenumadon de la interkonsentoj prenitaj de la Organizo per ĝiaj Kongresoj kaj Konfederaciaj Plenoj. Ĝi konsistas el la Konstanta Sekretariaro kaj la Sekretarioj de la diversaj Teritoriaj Konfederacioj kaj Sektoraj Federacioj.

Ĉiu Ĝenerala Sekretario de Teritoria Konfederacio, reprezentante ĝin, havas la voĉdonojn, kiuj al li respondas laŭ la sekva tabulo de aniĝintoj:

Ĝis 100 aniĝintoj 1 voĉdono

De 101 ĝis 500 2 voĉdonoj

De 501 ĝis 1.000 3 voĉdonoj

De 1.001 ĝis 2.000 4 voĉdonoj

De 2001 antaŭen 1 plia voĉdono po 2.000 aniĝintoj aŭ frakcio.

Nur oni uzu la proporcian voĉdonon, kiam neniel povas atingi sin ĝenerala akordo pri konsento. Ĉi-okaze, por atingi interkonsenton oni postulas almenaŭ la favoran voĉdonon de triono de la Ĝeneralaj Sekretarioj de la Konfederacioj, rondigante ĝin altige. La proporcian voĉdonon oni nur povas uzi pri temoj, aperantaj en la Tagordo de la kunveno.

La Sekretarioj de la Federacioj rajtas voĉdoni, kiam temas pri depostulaj aferoj. La Federacioj, samkiel la Konstanta Sekretariaro, ĉi tiu de korporacia maniero, havas unu voĉdonon.

Artikolo 46a. La Konfederacia Komitato de la ĜKL kunvenas ordinare ĉiu du monatoj, kaj eksterordinare kiam tion konsideras konvena la Konstanta Sekretariaro aŭ triono de la membroj de la Komitato.

Oni kunvokos la Komitatkunvenojn minimume kun dek kvin tagoj de anticipo, elsendante la tagordon al iliaj membroj kaj la dokumentaron, kiun oni konsideras bezona por faciligi ĝian taŭgan analizon. Okaze de eksterordinara kunvoko, oni elsendos kun la maksimuma ebla anticipo la Tagordon, kiu konsistas el la temoj, estigitaj la kunvokon. Estas deviga la okazigo de Komitatkunvenoj en la Teritoriaj Konfederacioj antaŭ ol la okazigo de la Tutlandaj Ordinara Komitatkunvenoj.

Kvara ĉapitro. Pri la Konstanta Sekretariaro de la Konfederacia Komitato de la ĜKL

Artikolo 47a. La Konstanta Sekretariaro de la Konfederacia Komitato de la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro (ĜKL) estas la maksimuma administradorgano de la Organizo. Ĝi kunordigas kaj disvolvas la laboron de la Konfederacia Komitato de la ĜKL por ke la interkonsentoj kaj decidoj de la Organizo efikece plenumiĝu.

Artikolo 48a. La Konstanta Sekretariaro de la Konfederacia Komitato de la ĜKL konsistas el la Ĝenerala Sekretario kaj la Sekretarioj pri: Organizo, kiu ankaŭ enhavas la Ĝeneralan Vicsekretarion, Sindikata Agado, Administrado kaj Financoj, Komunikado, Socia Agado kaj tiuj aliaj, kiujn oni kreas konvenaj ĝis kvar pli.

Artikolo 49a. La Konstanta Sekretariaro de la Konfederacia Komitato de la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro (ĜKL) estos elektita de la Konfederacia Kongreso kaj escepte de Konfederacia Pleno, inter la malfermitaj kandidataroj kvankam ili estas nekompletaj, nomumante la posteno(j)n, proponita(j) de la sindikatoj. Tiuj kandidataroj estos publikigitaj 15 tagoj antaŭ ol la elekto.

Artikolo 50a. La restadperiodo en la posteno kiel membroj de la Konstanta Sekretariaro, ankaŭ la Ĝenerala Sekretario, estas kvar jaroj, restante provizoraj dum la procezo de renovigo, neniel rajtante ripeti pli ol du sekvaj mandatoj.

Kvina ĉapitro. Pri la Ĝenerala Sekretario de la ĜKL

Artikolo 51a. La Ĝenerala Sekretario de la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro (ĜKL) havas la publikan kaj leĝan reprezenton de la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro, havante la leĝajn potencojn, kiuj al li respondas pro koncerna reprezento kaj specife aperas en la aneksaĵoj de ĉi tiu statuto. Ĉi tiuj potencoj estas plenumitaj pri aferoj de intereso por la ĜKL estante li respondeca antaŭ ĝi pri sia administrado.

Sesa ĉapitro. Pri la Tutlanda Konferenco de la ĜKL

Artikolo 52a. Oni difinas la Tutlandan Konferencon de la ĜKL kiel organon de debato kaj decido pri temoj de sindikata naturo de la ĜKL kaj, speciale, tiuj rilataj kun Kolektiva Intertraktado kaj Sindikataj Elektioj. Ĝi okazas ĉiu 2 jaroj (alternante ĉiujare kun la Konfederaciaj Plenoj).

Artikolo 53a. La Ĝenerala Sekretario kunvokas la Tutlandan Konferencon de la ĜKL minimume kvar monatoj antaŭ ol la dato de ĝia okazo. En la Kunvoko aperu la dato, la loko de okazo kaj ĝia Tagordo, kiu estas ellaborita de la Sekretario pri Sindikata Agado de la KS de la Konfederacia Komitato, post konsulto al la Ĝeneralaj Sekretarioj de la Konfederacioj kaj la Sektoraj Federacioj. Samkiel por la Pleno starigas limtempo da 45 tagoj por alporti verkojn por ilia debato en la Ĝenerala Kunveno de la Konferenco.

Artikolo 54a. La Tutlanda Konferenco konsistas el la delegitoj de la Sindikatoj, el la sekretarioj pri Sindikata Agado de la Sektoraj Federacioj kaj el la Konfederacia Komitato. Nur havas voĉdonrajton la delegitoj de la Sindikatoj.

Artikolo 55a. La voĉdonoj atribuitaj al ĉiu delegacio atingas sin laŭ la mezumo de kotizoj de la 9 antaŭaj monatoj al la okazo de la Konferenco, aplikante la tabulojn starigitaj por la Sindikatoj en la Kongresoj. La antaŭan monaton al la Konferenco oni ne prenas en konsidero por ĉi tiu kalkulo.

Artikolo 56a. La Konferencomalfermon plenumas la Ĝenerala Sekretario, kiu konsistigas la nomitan Malfermestraron kun la cetero de la Konstanta Sekretariaro.

Ĉi tiu estraro disvolvas:

- La determinon de la hortabelo de kunsidoj.
- La elekton de la Komisiono pri Atestiloj.

-La elekton de la Konferencestraro.

Artikolo 57a. La Konferencestraro konsistas el Prezidanto, du Sekretarioj pri Aktoj kaj unu pri Parolvicoj, kun la samaj atribuoj, kiujn havas la Kongresestraroj.

Artikolo 58a. La Komisiono pri Atestiloj konsistas el tri konferencdelegitaj membroj, la Sekretario pri Organizo kaj la Sekretario pri Administrado kaj Financoj de la Konstanta Sekretariaro de la Konfederacia Komitato. Ĉi tiu Komisiono elsendas informon al la Konferenco.

Artikolo 59a. Se necesus elekti Komisionojn de Rezolucipropono, ĉi tiuj konsistas el la delegitoj elektitaj de la Konferenco. La Komisiono prezentas al la Konferenco la ellaboritan raporton, kiun tuj poste oni prezentas al ĝia Pleno, povante la Sindikatoj, kiuj tion deziras, prezenti partajn amendojn, kiuj neniel –laŭ opinio de la Komisiono– ŝanĝas nek kontraŭas la sencon kaj enhavon de la traktita raporto, en kies okazo oni devas prezenti ilin kiel apartan voĉdonon.

Ĉiu Komisiono pri Rezolucipropono kunvenas por debati la amendojn, kiujn ĝi akceptas aŭ ne, ellaborante tuj poste sian definitivan raporton, kiun ĝi prezentas al la Pleno por ĝia diskutado kaj balotado. La ne akceptitaj amendoj eblas esti aliigitaj en apartaj voĉdonoj konsente kun tio esprimita per la Regularo de Kongresoj.

8a titolo: Pri la Konfederacia Komisiono pri Garantioj

Artikolo 60a. Ĉiuj konfliktaĵaj situacioj, kiuj okazas pro neplenumo aŭ malobeo al la Statuto kaj internaj Regularoj, pro neplenumo de interkonsentoj formale prenitaj de la Organizo, pro skribitaj aŭ parolaj atakoj aŭ ofendoj, pro kontraŭaniĝintaj interkonsentoj, kiujn ĉi tiuj konsideras malutilaj por ili, kaj definitive pro ĉiuj aferoj, kiuj povas malobservi la bonan funkciadon de la ĜKL kaj la reciprokan respekton, se ili ne estus solvitaj de la disputantoj, kaj ĉiam, kiam almenaŭ unu el ili volas proponi ĝin, devos solviĝi en la sama kampo kie ili estiĝas, ĉu laŭ la reguligo de la responda Komisiono pri Garantioj ĉu per la organa meĥanismo, kiun determinas la koncerna kampo.

Artikolo 61a. Ĉiu Konfederacio starigas ene de sia sfero meĥanisman, kiu garantiu la apelacieblojn de ĉiuj ĝiaj organoj kaj aniĝintoj en la aferoj, kiujn indikas la antaŭa artikolo.

Artikolo 62a. Por la aferoj estiĝintaj inter Teritoriaj Konfederacioj, inter Sektoraj Federacioj aŭ de kiu ajn el ili inter si aŭ, esceptokaze, kun Federalaj Sindikatoj, kiuj estas aliĝintaj al neniu Sektora Federacio, aŭ por tiuj, kiuj koncernas membrojn de la Konfederacia Komitato, oni starigos Konfederacian Komisionon de Garantioj.

Artikolo 63a. Ĉiu Konfederacio elektas delegiton dum Konfederacia Teritoria Pleno, minimume apogita de la du trionoj de la ĉeestantaj voĉdonoj. El inter ĉiuj ili, kaj antaŭ konkreta malkonsento, oni nomumas tri membrojn per lotado, ekskludante tiujn reprezentantojn de organoj koncernitaj de la konflikto. Oni akordas, ke en limtempo da ses monatoj ĉiu Teritoria Konfederacio nomumu la respondan membron por koncerna Komisiono.

Artikolo 64a. La enspezoj, kiujn estigas la disvolviĝo de la funkcioj de la Komisiono estos pagataj de la buĝeto de la Konstanta Sekretariaro de la Konfederacia Komitato.

Artikolo 65a. Povas konsistigi la Komisionon ĉiuj tiuj aniĝintoj al la ĜKL, kiuj ne estas senrajtigitaj por tio. Neeblas esti membro de la Komisiono kaj aparteni al iu Konstanta Sekretariaro de la Konfederaciaj Komitatoj kaj la Tutlandaj Sektoraj Federacioj.

Artikolo 66a. Por disvolvi sian esploran laboron kaj la pli bona komprenigo de la traktita problemo, la Komisiono havas aliron al la tuta dokumentaro, kiun ĝi konsideras bezona: ĉiuj organoj de la ĜKL estas devigataj kunlabori kun ĝi ĉiam, kiam ĝi postulas tion.

La celo de la Komisiono estas plenumi konsentoproponon, kiu permesas la solvon de la konflikto respektante la Statuton kaj Regularojn de la Konfederacio kaj, lastinstance, elsendi informon al la Konfederacia Komitato kaj al la koncernitaj organoj.

Ĝiaj rezolucioj neniam havas plenuman karakteron.

Artikolo 67a. Por peti la intervenon de la Komisiono pri disputo aŭ malkonsento, oni elsendas al la Konfederacia Komitato la skribe formalan peton de la organo, petanta ĝian intervenon. Per tiu, oni priskribas la faktojn kaŭzantaj, laŭ opinio de la petantoj, la intervenon de la Komisiono.

Post ricevi la skribitan peton, la Konfederacia Komitato dum Komitatkunveno plenumas la respondan lotadon por nomumi la tri membrojn, kiuj konsistigas la Komisionon.

Artikolo 68a. Se iumomente, dum daŭras la klariga proceso, retiras la peton la akuzantoj, kaj se ĉi tiu kaŭzas neniamajn damaĝojn al aliaj membroj de la Organizo, oni konsideru finita la laboron de la Komisiono.

Artikolo 69a. Kiam la Komisiono konsideras sufiĉe analizita la temon, ĝi elsendas respondan informon. Ĉi tio efektiviĝos maksimume du monatoj post la starigo de la Komisiono.

Artikolo 70a. Se la konkludoj de la Komisiono ne estas akceptitaj de la disputantoj, la Konfederacia Komitato elsendos la informon de tiu Komisiono al la Teritoriaj Konfederacioj por ke Konfederacia Pleno findecidu.

9a titolo: Malfondo de la ĜKL

Artikolo 71a. La ĜKL ne povas malfondiĝi se almenaŭ tion interkonsentas triono de la sindikatoj aliĝintaj al ĝi, kunvenintaj en Konfederacia Kongreso kunvokita por tio, en kiu oni solvu ĉiujn problemojn devenantaj de tiu malfondo.

Artikolo 72a. Okaze de malfondo de la ĜKL, la Kongreso mem kunvokita por tio decidu pri la destino, kiun ĝi donos al ĝia havaĵaro.

Malgraŭ tio antaŭa, la bienoj de la s/ Sagunto 15 de Madrido, en kiuj nuntempe havas sian sidejon la Konfederacia Komitato de la ĜKL, aŭ kiuj anstataŭe de ĉi tiuj ĝi povus akiri, tute estos donitaj al senprofitcela fondaĵo, kiu havas inter siaj celoj tiujn, kiujn difinas la litero f) de la 2a artikolo el ĉi tiu Statuto.

10a titolo: Kunfandiĝo de la ĜKL

Artikolo 73a. La kunfandiĝo de la ĜKL kun ajna sindikata organizaĵo povas efektiviĝi se interkonsentas tion pli ol du triono de la sindikatoj aliĝintaj al ĝi, kunvenintaj en Konfederacia Kongreso kunvokita por tio, en kiu oni solvu ĉiujn problemojn devenantaj de tiu kunfandiĝo.

11a titolo: Pri la havaĵaro de la ĜKL

Artikolo 74a. La havaĵaro de la ĜKL konsistas el:

- a) La kotizoj de ĝiaj membroj.
- b) La nomita NKL-a historia havaĵaro, kiu povus aparteni al ĝi.
- c) La moveblaĵaj kaj nmoveblaĵaj posedaĵoj, kiuj ajnmaniere eblis aŭ eblas esti akiritaj de la Organizo kaj el la enspezoj, kiujn estigas la cititaj posedaĵoj.
- d) Ajna alia rimedo leĝe akirita.

Artikolo 75a. Per la diversaj Sekretarioj pri Administrado kaj Financoj, tiel la aniĝintoj, kiel la konfederaciaj organoj povas peti kaj rajtas la konon pri la ekonomia situacio de la organizorgano, al kiu ili estas aliĝintaj, kun priskribo de la karaktero, origino kaj celo de la respektivaj disponeblaj ekonomiaj rimedoj.

12a titolo: Transiraj, aldonaj kaj finaj Dispozicioj

Transiraj dispozicioj

Unua. La sindikatoj nuntempe stariĝintaj kun malpli ol 75 aniĝintoj, daŭrigos kiel tiaj ĝis la sekva tutlanda Oficiala Kunveno de sindikatoj (Konferenco aŭ Kongreso), momento je kiu, se ili ne atingas la menciitajn 75 aniĝintojn, ili sekciigu en la Diverssektora sindikato.

Por la sindikatoj de nova kreo, sekvu la 11an Artikolon de ĉi tiu Statuto.

Aldonaj dispozicioj.

Unua. La duboj, kiujn povas esti la interpreto de ĉi tiu Statuto estu solvitaj per rezolucioj de la Konfederacia Komitato de la ĜKL kun plimulto de du trionoj, ĝis kiam la unua Pleno aŭ la tuja Konfederacia Kongreso definitive decidas.

Dua. Kiam la organo, al kiu respondas kunvoki ajnan oficialan kunvenon (ordinaran aŭ eksterordinaran), de la Asembleo de Sindikato ĝis la Konfederacia Kongreso, ne prizorgas la formalan peton, kiun por tio prezentas la interesuloj pri koncerna kunvoko (aniĝintoj, sindikatoj..., laŭ kiu oficiala kunveno ĝi estas), la petantoj rajtus fari ĝin, per la KS de la tuje supera organo, sekvante por tio la ĉi-rilate ekzistantan regularon.

Ĉi tiu dispozicio estas aplikebla al ĉiuj konfederaciaj organoj.

Tria. La Ĝenerala Konfederacio de la Laboro (ĜKL) ne respondas, eĉ de anstataŭa maniero, pri la agoj aŭ neglektaĵoj faritaj de la diversaj organoj federaciitaj al ĝi, krom se intence kaj skribe ili estis rajtigitaj de la Konstanta Sekretariaro de la Konfederacia Komitato de la ĜKL aŭ ekzistas ĉi-rilate firma interkonsento.

Kvara. Akorde kun la interkonsento de la 13a Kongreso pri stimuli la memorganizado de gesendungitoj, la ĜKL organizu siajn geaniĝintojn en senlaborecosituacio per la sindikatoj laŭ ilia lasta laboro, ilia sektoro de tradicia laboro aŭ per la Diverssektoraj sindikatoj okaze de gesenlaboruloj serĉantaj sian unuan laboron.

Samtempe la diversaj teritoriaj organoj stimulu la kreon de kunordigantoj, kiuj por ĉiu Konfederacio starigas konfederacian kunordiganton de gesendungitoj de la ĜKL.

Por tio, la Konfederacia Komitato de la ĜKL havigu rimedojn al ĉi tiu kunordiganto por ĝia funkciado.

Finaj dispozicioj.

Unua. Ĉi tiu Statuto ekvalidos kiam ĝi estos publikigita de la Konstanta Sekretario de la Konfederacia Komitato de la ĜKL kaj, ajnokaze, post du monatoj de la fintaĝo de la Kongreso, aprobinta ĝin, devante esti observita de ĉiuj membroj kaj organoj federaciitaj aŭ aliĝintaj al la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro (ĜKL).

Dua. Tio starigita per ĉi tiu Statuto nur eblas esti reviziata kaj modifata de la Konfederacia Kongreso de la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro (ĜKL), aperante tion klare esprimita en la Tagordo. Ajna modifo al la aktuala Statuto kaj Regularoj de la ĜKL devas havi favoran plimulton de du trionoj el la voĉdonoj.

Tria. Al la oficialaj kunvenoj de tutlanda karaktero, kiujn okazigas la ĜKL, ĉu ordinaj ĉu eksterordinaraj, neniu konfederacia organo povas ĉeesti reprezentita de frakcia maniero, sed kun la tutaj voĉdonoj, kiuj al ĝi respondas laŭ starigas ĉi tiu Statuto.

Tamen oni rajtas starigi la reprezenton de minoritatoj en la teritoriaj sferoj, ĉiam laŭ tio esprimita tuj poste:

-Tio nur povus apliki sin ĝis kie finas la respektiva nivelo de propra agado.

-Antaŭe la koncernitoj devas tion decidi per organa maniero, tial ĉiu organo volonta tion devas okazigi sian respondan oficialan kunvenon, ĉu la Asembleo (okaze de Sindikatoj), ĉu Pleno (okaze de urbaj, distriktaĵaj, interdistriktaĵaj aŭ provincaĵaj Federacioj), ĉu Kongreso (okaze de teritoriaĵaj Konfederacioj).

-La Sektoraj Federacioj kaj/aŭ Federaciaĵaj Sindikatoj ne rajtas akordigi similajn normojn de reprezento, ĉar iliaj oficialaj kunvenoj okazas en la tutlanda sfero.

-Kvankam Konfederacio aŭ teritoria Federacio aprobas la aplikon de la 30% de reprezentiveco por la oficialaj kunvenoj je sia kampo, se unu el la koncernitaj Sindikatoj aprobas per simpla plimulto en asembleo la ne dividon de siaj voĉdonoj, kaj tiel tion ĝi skribas en sia aparta normaro, neniu povas devigi ĝin al tio, ĉar ĉiam estas supera la decid- kaj agad-memstareco de la Sindikato.

-Kiu en sia kampo volas apliki ĉi tiun aferon, ĝin devas enhavi en sia organa Statuto.

Aneksa al la statuto de la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro (ĜKL)

La Ĝenerala Sekretario, reprezentante la Organizon, povas interveni kaj agi en ĉiu klaso de juraj faktoj, faroj kaj negocoj, plenumante, cedante, estingante aŭ elĉerpante rajtojn, agojn aŭ esceptojn en ĉiuj siaj konsekvencoj kaj eksterordinaraj aŭ ordinaraj apelacioj, inkluditaj tiuj de plendo, civila respondeco, kasacio, revizio antaŭ la Juĝejoj, Tribunaloj, Juĝistaroj, institucioj, korporacioj, aŭtoritatoj kaj funkciuloj de ajna branĉo, rango, jurisdikcio –inkluditaj la civila (jurkonflikta kaj propra-vola), kriminala, per denunco, kverelo aŭ civila parto, registara, jurkonfliktoj kaj ekonomia-administraj, sociala aŭ de la laboro, la ekonomio, la terkulturo, la loĝejo, impostoj, sindikata aŭ ajna alia komuna aŭ speciala, jam kreita aŭ kreota— kun tiomaj rajtoj estas motivo, disvolvado, komplemento aŭ konsekvenco de lia plena procesa agado ĝis atingi definitivon favoran, firman kaj plenumigan rezolucion kaj ĝian aplikon.

Li povos submeti sin al kompetenteco, senkreditigi kaj malakcepti, konfirmi skribaĵojn kaj petaĵojn, fari personajn aperojn, simplajn aŭ ĵuristajn deklarojn; fari enspezojn kaj pagon de monkvantoj. Labori kun ŝparkaso, oficialaj kaso, bankoj, inkluzive tiu de Hispanio kaj ties filioj, farante ĉion, kion la leĝaro kaj bankaj praktikoj permesas. Sekvi, malfermi kaj nuligi kurantajn kontojn kaj ŝparlibretojn, kreditkontojn kaj monŝrankojn. Administri laŭ la plej ampleksaj terminoj moveblaĵojn kaj nmoveblaĵojn. Rekoni ŝuldojn kaj akcepti kreditojn, fari kaj ricevi pruntojn. Aĉeti, vendi aŭ interŝanĝi entuta aŭ laŭkondiĉe, kun konfesita prezo, prokrastita aŭ kontante pagita ĉiun klason de havaĵoj kaj nmoveblaĵoj, personaj kaj realaj rajtoj. Konstitui, akcepti, modifi, prokrasti kaj nuligi, entute aŭ parte, antaŭ aŭ post lia pagdato, plenumita aŭ ne la asekurita devo, hipotekojn, garantiaĵojn, malpermesojn kaj ĉiun klason de garantioj.

Li povas fini aŭ nuligi juĝajn prenojn, sekvestroj kaj preventajn notojn, peti eldomigojn, senposedigojn kaj posedon de havaĵoj. Peti la atribumon de havaĵoj kiel pagon de ĉio aŭ parto de postulitaj kreditoj aŭ kvantoj; insisti aŭ kontraŭstari juĝajn permesojn, administrajn procesojn de deponaĵo, liberigo aŭ proprietrajto, nomumi fakulojn, sindikojn, administrantojn, intervenantojn kaj membrojn de korporaciaj tribunaloj, fari, ricevi kaj plenigi asignojn kaj juĝajn sciigojn. Doni potencojn al advokatoj kaj prokuristoj.

Li povas komisi funkciojn, rajtojn kaj potencojn al la membroj de la Konstanta Sekretariaro de la Konfederacia Komitato, de la Konstantaj Sekretariaroj de la Teritoriaj Konfederacioj kaj de la Konstantaj Sekretariaroj de la Sektoraj Federacioj.

**Regularo de Kongresoj
de la
ĜKL**

Regularo de Kongresoj de la ĜKL

Kunvoko

Artikolo 1a. La Ordinaran Konfederacian Kongreson de la ĜKL kunvokas la Ĝenerala Sekretario, en la loko kaj dato, kiujn akordigas Konfederaciaj Pleno aŭ Komitatkunveno de la ĜKL, dum periodo inter la du antaŭaj kaj la kvar postaj monatoj al la fariĝo de la kvar jaroj de la lasta Ordinara Kongreso. Ĉiuokaze, oni kunvoku minimume kun sep monatoj de anticipo al ĝia komencdato. Se estus Eksterordinara Kongreso oni kunvoku almenaŭ kun du monatoj de anticipo. Ĉi-okaze oni povas kunvoki ĝin per interkonsento de la Konfederacia Komitato.

Same oni kunvoku Eksterordinaran Kongreson ĉiam, kiam formale petas tion nombro da Sindikatoj, kiuj reprezentas almenaŭ trionon de la sumo de la voĉdonoj de ĉiuj sindikatoj apartenantaj al la Konfederacio. Neniel oni okazigu nek Eksterordinaran Kongreson, nek Konfederacian aŭ Federacian Plenon, antaŭ ol tri monatoj post la okazo de la lasta Kongreso nek dum la ses antaŭaj monatoj al la sekva.

Artikolo 2a. La Ĝenerala Sekretario elsendas la kunvokon de la Kongreso rekte al la Sindikatoj, akompanante ĝin de indika kaj provizora Tagordo, laŭ lia kriterio kaj konsiderante la konon, kiun li havas pri la tuta Organizo.

Okaze de Eksterordinara Kongreso, ĉi tiu Tagordo estas definitiva, devante dediĉi sin ununure pri la temoj okazigantaj ĝian kunvokon kaj estas ellaborita dum la Konfederaciaj Pleno aŭ Komitato, en kiu oni decidas ĝian okazigon.

Artikolo 3a. Post determini la daton kaj lokon de okazo de la Kongreso kaj kun limtempo da unu monato, oni starigas la Organizantan Komisionon de la Kongreso, konsistigita de la Sekretario pri Organizo de la Konstanta Sekretariaro de la Konfederacia Komitato, kiu estas ĝia koordinanto, la membroj de la KS, kiujn oni kredas bezonaj kaj la Sekretarioj pri Organizo de la teritoria Konfederacia Komitato kaj de la Urba Federacio, kie okazos la Kongreso.

Artikolo 4a. Ekde la senddato de la kunvoko kaj provizora Tagordo de la Kongreso, la sindikatoj havas dek kvin tagojn por elsendi al la KS la modifojn aŭ novajn proponojn, kiujn ili konsideras oportunaj. Finita ĉi tiu limtempo kaj post la analizo de la ricevitaj kontribuajtoj kaj la bezona laboro de sintezo, la Konfederacia Komitato de la ĜKL decidas la definitivan Tagordon, kiun la Ĝenerala Sekretario elsendas kun limtempo da dek kvin tagoj al la sindikatoj por ĝiaj laboro kaj diskutado.

Oni klopodu, ke la reellaborita Tagordo estu:

-Vaste interkonsentigita, devige konsistigita de tiuj punktoj, kiuj estas proponitaj de la plimulto de la Sindikatoj.

-Realisma, t. e., rilatita al la necesoj de la Laborisma Movado kaj la ĜKL.

-Forigante ĉiun temon, kiu povas solviĝi en diversaj teritoriaj sferoj aŭ oficialaj kunvenoj de malsupera kampo.

Artikolo 5a. Post publikigi la definitivan Tagordon kaj en la maksimuma limtempo da 2 monatoj, oni elsendu al la Organizanta Komisiono la verkojn pri la temoj aperantaj en la Tagordo prezentitaj de ajna aniĝinto, individua aŭ kolektive, sindikato aŭ komitato por ilia disvastigo tra la tuta Organizo. La rezolucipropono, ne ricevita dum ĉi tiu limtempo, ne validas por la cetero de la proceso. La Organizanta Komisiono distribuos je la maksimuma limtempo da 45 tagoj la ricevitajn kontribuojn.

Starigo kaj malfermo de la Kongreso

Artikolo 6a. La Konfederacia Kongreso de la ĜKL konsistas el la rektaj delegitoj de la Sindikatoj, demokratie elektitaj en ilia responda Asembleo. Rajtas sendi delegitojn tiuj Sindikatoj, kiuj tiumomente estas pagintaj siajn kotizojn, starigitaj aŭ federaciitaj al la ĜKL almenaŭ ses monatoj antaŭ ol la okazo. Same rajtos sendi ilin tiuj Sindikatoj, kiuj federaciis ene de la ses antaŭaj monatoj al la okazdato de la Kongreso ĉiam, kiam ili ankaŭ tiumomente estas pagintaj siajn kotizojn, kun rajto al voĉo sed ne al voĉdono. Same, la membroj de la Konfederacia Komitato ĉeestas kun voĉ- kaj sen voĉdon-rajto.

Artikolo 7a. La Sekretario pri Financoj de la KS oficiale certigas la kotizojn de la sindikatoj kaj du monatoj antaŭ ol la Kongreskomenco distribuas la informan tabulon de ĉiuj sindikatoj, kun ties respektivaj voĉdonoj, kiu estas provizora, donante limtempon da ĝis unu monato antaŭ ol la Kongreskomenco por reklamacioj, kiujn oni devos solvi antaŭ ol 20 tagoj de la Kongreskomenco, por ke en ĉi tiu dato oni distribuu la definitivan tabulon enhavante la voĉdonojn de ĉiu partoprenanta organo en la menciita oficiala kunveno.

Artikolo 8a. La Sindikatoj, kiuj plenrajte partoprenas en la Konfederacia Kongreso havas la voĉdonojn, kiuj tuj poste enlistigas sin rilate al la mezumo de kotizoj de la lastaj dek du antaŭaj monatoj al la okazdato de la kongreso konsiderante, ke la tuje antaŭa monato estas neuzabla por ĉi tiu kalkulo:

- De 10 aniĝintoj ĝis 50 1 voĉdono
- De 51 aniĝintoj ĝis 75 2 voĉdonoj
- De 76 aniĝintoj ĝis 100 3 voĉdonoj
- De 101 aniĝintoj ĝis 150 4 voĉdonoj
- De 151 aniĝintoj ĝis 200 5 voĉdonoj
- De 201 aniĝintoj ĝis 250 6 voĉdonoj
- De 251 aniĝintoj ĝis 300 7 voĉdonoj
- De 300 aniĝintoj antaŭen 1 plia voĉdono po ĉiu 100 aŭ frakcio.

Artikolo 9a. La Organizanta Komisiono de la Kongreso akceptas la delegitojn donante al ili la devigan atestilon. La delegitoj devas tiumomente transdoni la atestilon de la sindikato, kiun ili reprezentas, kaj la kopion de la interkonsentoj, kiujn ili alportas por ĉiu el la punktoj de la Tagordo.

Tamen, kun minimumo da 5 tagoj de anticipo la sindikatoj devas elsendi siajn menciitajn interkonsentoj al la Organizanta Komisiono, estante tio nepra, por ke ili estu prenitaj en konsidero de la respektivaj Komisionoj de Rezolucipropono.

Same, la sindikatoj devas elsendi kun minimumo da 10 tagoj de anticipo al la Organizanta Komisiono la balotadojn por la elekto de la diversaj Teknikaj Komisionoj, Komisionoj de Rezolucipropono kaj Kongresestraro. Tiam decidon povas preni la KS de la responda sindikato, sen bezono okazigi Asembleon por tio.

Estas funkcio de la Organizanta Komisiono oficiale ekzameni la ricevitaĵajn balotadojn, komuniki la rezultaton al la sindikatoj, kiuj estas elektitaj kaj postuli skribe iliajn konformecon kaj disponeblecon por kunveni inter unu kaj tri tagoj antaŭ ol la Kongreskomenco kaj, se eblas, kunvoki ilin por ke ili povu progresi iliajn laborojn kaj elsendi unuan indikan raporton pri la respektivaj rezultoj, diskonigante ĝin skribe je la Kongreskomenco, tiel al la Kongresestraro, kiel al la diversaj delegacioj de la ĉeestantaj sindikatoj.

Artikolo 10a. La akcepto de delegacioj provizore fermiĝas unu horo antaŭ ol la Kongreskomenco, por ke, kiam ĝi komencas, la Organizanta Komisiono povu havigi la definitivan liston de ĉeestantaj delegacioj.

Artikolo 11a. La malfermon de la Konfederacia Kongreso plenumas la Ĝenerala Sekretario kune kun la KS de la Konfederacia Komitato, kiu konsistigas, kune kun la aliaj membroj de la Konfederacia Komitato, la nomitan Malfermestraron.

Ĉi tiu Malfermestraro devas moderigi la sekvajn temojn:

- Determini la hortabelon de kunsidoj.
- Prezenti kaj cedi la kontrolon al la Kongresestraro.

Invitoj

Artikolo 12a. La Organizoj de tutlanda kaj internacia kampo estos invititaj de la Konfederacia Komitato, ĉu per propra iniciato aŭ per propono de iu sindikato aŭ organo de la Konfederacio.

Tiu de malsupera kampo estos invititaj de la responda konfederacia organo kun la aprobo de la Konfederacia Komitato de la ĜKL, kiu publikigos la provizoran liston de invititaj institucioj kaj personoj 15 tagoj antaŭ ol la Kongreskomenco.

Kongresestraro

Artikolo 13a. La Kongresestraro estas la komisiito kunordigi kaj direkti la disvolviĝon de la diversaj laboroj de la Konfederacia Kongreso de la ĜKL. Ĝi estas konsistigita de Prezidanto, Vicprezidanto, ses Sekretarioj pri Aktoj, kiuj alternas en siaj funkcioj po du laŭ sia propra kriterio kaj du Sekretarioj pri Parolvicoj.

Estas funkcio de la Prezidanto kaj en sia foresto de la Vicprezidanto moderigi la respondan debaton priatentante por ke la diversaj intervenoj akordiĝu al la traktita temo kaj la manieroj estu la ĝustaj, por ke la debatoj plenumiĝu fluece kaj efikece, havante la maksimuman decidkapablon dum la tuta daŭro de la Kongreso por atingi tiujn celojn.

Estas funkcio de la Sekretarioj pri Aktoj atesti plej eble fidele la disvolviĝon de la debatoj, proponoj kaj balotadoj, povante proviziĝi per la Organizanta Komisiono de la Kongreso de la bezonaj teknikaj rimedoj por plenumi tiun celon. La aktojn devas ellabori la Kongresestraro, subskribante ilin la Prezidanto kaj la Sekretarioj pri Aktoj.

Estas funkcio de la Sekretarioj pri Parolvicoj noti la ordon de la intervenoj kaj kunlabori kun la cetero de la Kongresestraro ĉefe por la kunordigo kun la Komisiono pri Balotkontrolo.

Artikolo 14a. La starigo de la Kongresestraro efektiviĝas je la komenco de la kongreso prezidita de la Malfermestraro.

Pri la Komisionoj de Laboro

Revizia Komisiono pri Atestiloj

Artikolo 15a. La Revizia Komisiono pri Atestiloj estas la komisiito ekzameni la atestilojn de la delegacioj ĉeestantaj al la Konfederacia Kongreso, prezentante al ĝi la respondan informon pri siaj konkludoj.

Ĝi konsistas el kvin membroj kaj la Sekretario pri Organizo de la KS, ĉi tiu lasta kun voĉ- kaj sen voĉdon-raĵto.

Por disvolvi sian laboron ĝi povas postuli la kunlaboradon de la Sekretarioj pri Organizo de la diversaj Konfederaciaj Komitatoj.

La informo ellaborita de ĉi tiu Komisiono devas almenaŭ esti apogita de tri komisionanoj kun voĉdonraĵto.

Revizia Komisiono pri Kontoj

Artikolon 16a. La Revizia Komisiono pri Kontoj estas la komisiito ekzameni la librotenadon de la Konstanta Sekretariaro de la Konfederacia Komitato de la ĜKL prezentante la respondan informon pri siaj konkludoj al la Kongreso. Ĝi konsistas el kvin membroj kaj la Sekretario pri Financoj de la KS, ĉi tiu lasta kun voĉ- kaj sen voĉdon-raĵto.

Por disvolvi sian laboron ili povas postuli la kunlaboradon de la Sekretarioj pri Financoj de la diversaj Konfederaciaj Komitatoj.

La informo ellaborita de ĉi tiu Komisiono devas almenaŭ esti apogita de tri komisionanoj kun voĉdonraĵto.

Komisiono pri Balotkontrolo

Artikolo 17a. La Komisiono pri Balotkontrolo estas la komisiito kontroli kaj definitivigi la balotkontrolon ellaboritan de la Organizanta Komisiono, solvi la reklamaciojn prezentatajn de la sindikatoj pri atribuo de voĉdonoj koncerne al la definitiva rezolucio de la Sekretario pri Financoj kaj kunlabori kun la Kongresestraro por tabeligi ĉiujn balotadojn plenumiĝantaj dum la disvolviĝo de la kongreso. Ĉi tiu komisiono konsistas el kvin membroj.

Komisionoj de Rezolucipropono

Artikolo 18a. La Komisionoj de Rezolucipropono estas la komisiitoj ellabori la raportojn relativaj al la diversaj punktoj de la Tagordo de la Kongreso, laŭ la interkonsentoj prezentitaj de la sindikatoj, post la bezona laboro de sintezo kaj la responde debato en la Komisiono.

Artikolo 19a. La Komisionoj de Rezolucipropono konsistas el naŭ membroj kun voĉ- kaj voĉdon-rajto. Ĉi tiuj elektas Prezidanton, kiu estas la komisiito moderigi la debatojn kaj gvidi la laborplanon de la Komisiono.

Artikolo 20a. Post la debato de la Komisiono, oni redaktos ties raporton; se ne estus unuanimeco, la nekonformaj membroj rajtas prezenti partiajn amendojn aŭ entutajn amendojn, se la malkonsento estus plena, alportante ĉi-okaze alternativan raporton.

Oni diskonigas ĉi tiujn raportojn kaj amendojn, se ekzistus, al la Pleno de la Kongreso.

Pri la debato dum la Kongrespleno

Artikolo 21a. Kiam alvenas la delegacioj al la Kongreso oni transdonas al ili la indikajn raportojn el la diversaj Komisionoj de Rezoluciproponoj, laŭ indikas la 9a Artikolo de ĉi tiu Regularo.

Post starigi la Kongresestraron kaj antaŭ la respektivaj Komisionoj de Rezoluciproponoj, la delegacioj rajtas prezenti la partiajn Amendojn, se ekzistus, kiuj neniel – laŭ opinio de la Komisiono – ŝanĝas nek kontraŭas la sencon kaj enhavon de la traktita raporto, en kies okazo oni devus prezenti kiel Apartan Voĉdonon.

Ĉiu Komisiono pri Rezolucipropono kunvenas por debati la Amendoj, kiujn ĝi akceptas aŭ ne, ellaborante tuj poste sian definitivajn raporton, kiun ĝi prezentas al la Kongrespleno por ĝia diskutado kaj baloto. La ne akceptitaj Amendoj eblas esti aligitaj en Apartaj Voĉdonoj, laŭ reguligas ĉi tiu Regularo.

Ekzisto de la ununura raporto en la Komisiono pri Rezolucipropono

Artikolo 22a. Se la Komisiono pri Rezoluciproponoj unuanimece estus aprobata la raporto, post ĝia prezento al la Kongrespleno, la Prezidanto de la Kongreestaro malfermas vicon de intervenoj ĉi-rilate, farante poste la respondan balotadon, sed antaŭe postulante la eblajn Apartajn Voĉdonojn, kiuj devas esti garantiitaj de almenaŭ la 5% de la voĉdonoj reprezentitaj en la Kongreso.

Tiaj Apartaj Voĉdonoj, se ekzistus, enhavu proponojn de alternativaj aŭ kompletigaj rezolucioj al la ununura raporto de la Komisiono.

Artikolo 23a. Se ne ekzistus apartaj voĉdonoj, oni ekbalotas la ununuran opinionon de la Komisiono pri Rezolucipropono: se ĝi ne estus aprobata, la Prezidanto de la Kongresestraro malfermas limigitan vicon de intervenoj, kaj iufoje finita li decidas la farotajn agojn.

Artikolo 24a. Se ekzistus apartaj voĉdonoj, la Prezidanto de la Kongresestraro koncedas la parolvicon por ilia defendo al la delegito nomumata de la sindikato iniciatinta de la aparta voĉdono en unua parolvico. Same la Komisiono nomumas el inter siaj membroj la komisiiton rebati lin.

Se la Prezidanto de la Kongresestraro konsiderus tion oportuna, ĝi povus koncedi duan parolvicon kun du pliaj intervenoj.

Finitaj ĉi tiuj, oni ekbalotas la du proponojn samtempe, restante kiel interkonsento tiun, kiu atingas la plimulton de la plenumitaj voĉdonoj.

Ekzisto de pluraj raportoj en la Komisiono pri Rezolucipropono

Artikolo 25a. Se la raporto de la Komisiono pri Rezolucipropono ne estus unuanima, ekzistante alternativaj raportoj, la Prezidanto de la Kongresestraro malfermas la debaton starigante la limigitajn parolvicojn, kiujn li kreas bezonaj por klarigi la poziciojn, povante limigi la tempon de la intervenoj laŭ la petitaj parolvicoj kaj la disvolviĝo de la Kongreso.

Post finas la debato, oni ekbalotas ĉiujn ekzistantajn opiniojn samtempe, estante la baza raporto de la Komisiono pri Rezolucipropono tiu, kiu atingas la plimulton.

Poste la prezidanto de la kongresestraro petas la apartajn voĉdonojn al la nova raporto por, post la bezona debato, submeti ilin al balotado, aligante al la fina interkonsento tiujn, kiuj atingas la plimulton krom por modifi Statuton, ke oni bezonas plimulton de 2/3.

Pri la balotadoj

Artikolo 26a. Oni povas baloti la rezoluciojn dum la Kongreso per aklamado, levita mano aŭ nominale. Tamen, kaj se la respektiva Kongresestraro konsiderus, ke ĝi povas plirapidigi la elekton de la balotadmaniero, ĝi povas efektiviĝi provbalotadoj por elekti la plejn taŭgan.

Oni nominale voĉdonas ĉiam, kiam la Kongresestraro konsideras bezone lasi registrite la esprimitan opinion de la ĉeestantaj delegacioj, aŭ tion petas la 10% de la ĉeestantaj delegacioj. Ĉiuokaze, oni voĉdonas de ĉi tiu lasta maniero por elekti la Konstantan Sekretariaron de la Konfederacia Komitato de la ĜKL kaj ties loĝejon.

Pri la elektoj

Artikolo 27a. Por elekti la loĝejon kaj la Konstantan Sekretariaron de la Konfederacia Komitato oni sekvu la sekvajn kriteriojn:

-Ajna sindikato rajtas prezenti malfermitajn kandidatarojn kvankam ili estas nekompletaj, nomumante la postenojn, kiu/j nepre estas akceptita/j de la geinterezito/j, kaj la loĝejon. Rajtas konsistigi kandidataron ajna aniĝinto al la ĜKL, kiu ne estas senrajtigita por tio.

-La kandidataroj estos senditaj al la ekzistanta KS kaj la Organizanta Komisiono de la Kongreso, kun 21 tagoj de anticipo al ĝia okazdato, kiu diskonigos ilin al la tutaj sindikatoj kun 15 tagoj de anticipo.

-Balotadoj efektiviĝas por ĉiu sekretario rezultante elektita la plej voĉdonita kandidato.

Interkonsentoj

Artikolo 28a. La interkonsentoj de Kongreso ekvalidos dek kvin tagoj post la nova KS publikigis ilin kaj maksimume du monatoj post la okazo de la Kongreso, krom la elektitaj postenoj, kiuj ekvalidas tiam, kiam la rezulto de ilia elekto estas konata.

Fermo

Artikolo 29a. La Fermon de la Konfederacia Kongreso de la ĜKL plenumas la

nova Ĝenerala Sekretario, kiu konsistigas Kongresestraron kun la cetero de la Konfederacia Komitato.

Aldona dispozicio

La interpreto de ĉi tiu Regularo respondas:

-Dum la plenumado de la Kongreso, al la respektiva Kongresestraro.

-Lastinstance kaj per peto de la 10% de la ĉeestantaj delegacioj, al la Kongrespleno.

Fina Dispozicio

La Modifoj de ĉi tiu Regularo nur povas efektiviĝi per Kongreso de la ĜKL kaj ekvalidos je la venonta Kongreso.

